



Amerika Asocio de Instruistoj de Esperanto  
American Association of Esperanto Teachers

(Sekcio de Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj)

(Branch of the International League of Esperantist Teachers)

Numero 180

ISSN: 0002-7499

aprilo 2009

## Enhavo

### AATE Matters

Jarkunsido Kadre de la Usona LK.....	1
AAIE Rubriko en La Usona Esperantisto.....	1
Pri Esperanto-Ekzamenoj.....	1
Esperanto Classes in the U.S. and Canada.....	2
Esperanto-Instruado Rete.....	2
ILEI Matters.....	2
Kalendaro.....	3
Recommended Reading.....	3
Esperanto-Instruado Alilande.....	3
Want to Correspond.....	4
Kunlaboro.....	4
From and About Our Members.....	4
Anoncoj.....	5
Two Ways You Can Help Create a New Esperantisto.....	5
Jarraportoj.....	5
Esperanto-USA's Correspondence Courses.....	6
Correspondence Course Registration Form.....	7
AATE Course Report Form.....	8
AATE Membership Form.....	9

### Redaktoro

Dorothea Holland, 5140 San Lorenzo Dr.,  
Santa Barbara CA 93111-2521 USA  
<dorotheajeanh@gmail.com>

*Vic-Prezidando / Bultena Formatisto / Retejestro*  
D Gary Grady <dgarygrady@verizon.net>

### Prezidanto

Ron Glossop <rglossop@mindspring.com>

### Eduka Sekretario

Sherry Wells <esperantosherry@tm.net>

### Korespondanta Sekretario

Sally Lawton <slaw-o@crocker.com>

### Kasisto

Mary Napolitan <mjpn@comcast.net>

<http://aaie.us>

## AATE Matters

### Jarkunsido Kadre de la Usona Landa Kongreso

Nia ĉi-jara kunsido okazos dimanĉon, la 24-an de majo de tagmezo ĝis 1:00 pm en la kadro de la landa kongreso de Esperanto-USA en St. Louis MO, kies temo estas "Kiel Varbi Novan Generacion". Nia tagordo inkluzivos la jenajn erojn:

- Jar-raportoj de nia prezidanto, vic-pezidanto, kaj kasisto; kaj de la Usona Ekzamena Servo, la Perkoresponda Kursaro de E-USA. (Vidu paĝojn 5-6)
- Ĉu AAIE ŝanĝu sian nomon? Se jes, ĉu al "Esperanto-Instruantoj en Usono kaj Kanado (EIUK)"?
- Bezonataj estas volontuloj por la Kandidatiga Komitato, kiu devos trovi kandidatojn por Prezidanto, Vic-prezidanto, kaj Korespondanta Sekretario kiuj deĵoros 2010-2012.

### AAIE-rubriko en La Usona Esperantisto

Ĉu vi rimarkis la AAIE/AATE rubrikon verkitan de nia vic-prezidanto D. Gary Grady en Usona Esperantisto (2009/1) pri "Kial oni brosas per broso sed kombas per kombilo"? Ĝi enhavas tre praktikajn sugestojn pri kiel instrui pri transitivaj kaj ne-transitivaj verboj en Esperanto.

### Pri Esperanto-ekzamenoj

The "Usona Ekzamena Servo" (UES), which is under the joint auspices of AATE and Esperanto-USA, will be offering all three of their Esperanto tests (Komencgrada, Mezgrada, Supera) at the Esperanto-USA convention in St. Louis the last week-end in May this year. The exams are for speakers of English only (the ILEI examinations, which are completely in Esperanto, are usually administered at international Esperanto conventions# (vidu la sekvan paĝon).




If you would like to take one of our UES exams in St. Louis, you must announce your intentions to the administrator\* before the convention. If you're not sure which test you should take, ask her for the syllabus of whichever ones you're interested in.

\* Dorothy Holland, Administrator, UES  
<[dorotheajeanh@gmail.com](mailto:dorotheajeanh@gmail.com)>; phone (805) 967-5241  
5140 San Lorenzo Dr., Santa Barbara C 93111-2521








# Novtipa Esperanto-ekzameno estis lastatempe lanĉita ĉe la Internacia Festivalo en Dusseldorf, Germanio. Temas pri Esperanto-ekzameno kiu komformas al la normoj de la Komuna Eŭropa Referenckadro kaj ofertas egalrangon mezuradon de la kvar bazaj lingvaj kapabloj en niveloj B1, B2, kaj C1. Ekzameniĝis 8 personoj el 6 landoj. Ekde nun

eblos organizi tiujn ekzamenojn (kiuj estas tute en Esperanto) en grandaj internaciaj renkontiĝoj aŭ aliloke, kie estos grupo de kandidatoj por almenaŭ unu el la tri niveloj. Por pli detalaj informoj vizitu <<http://www.edukado.net>> kaj ĉe la maldekstro de la paĝo klaku sur la ligo “NOVAJ UEA-EKZAMENOJ”.

## Esperanto Classes in the U.S. and Canada

-  Kim Keeble instruis Esperanton al 7 geknaboj ĉe “Cavalier Drive School” en Lower Sackville, N.S., Kanado de septembro 2008 ĝis junio 2009 unufojon ĉiun semajnon dum 45 minutoj dum la lunĉ-horo. La lerno-materialoj inkluzivis “Esperanto per Rekta Metodo” kaj “Dek Demandoj”. La patro de unu el la lernanto unue kontaktis la lernejestron kaj ricevis permeson ke Kim faru prezentadon antaŭ la tuta lernejanaro, dum kiu ŝi montris la unuan lecionon de “Mazi”. Kim raportis ke “It has helped various students to learn French and also to understand English grammar. One of my former students is teaching ESL in China and has contacted the Esperantists there.”
-  This year the annual North American Summer Classes (NASK), 3-week total-immersion Esperanto 3-credit courses on 3 levels, will take place at the University of California in San Diego from June 29 through July 17. For details contact Ellen Eddy <[eddyellen@aol.com](mailto:eddyellen@aol.com)> or <<http://Esperanto.org/nask/>> (phone 360-754-4563).
-  Okaze gimnazioj, kolegioj, aŭ universitatoj akceptas Esperanton kiel “independent study” projekto, kaj eĉ donas krediton se studanto sukcese skribas Esperanto-ekzamenon. Oni devas kontroli ĉiun situacion aparte. Se la instancoj konsentas, oni povas administri unu el la ekzamenoj de “U.S. Esperanto Test Service”.

## Esperanto-Instruado Rete

-  Laŭ Osmo Buller, la Ĝenerala Direktoro de UEA, <[lernu.net](http://lernu.net)> “nuntempe certe [estas] la plej granda Esperanto-lernejo en la mondo...”.
-  Ankaŭ tre populara estas <[edukado.net](http://edukado.net)>, kiun uzas 1800 esperantistoj en pli ol 100 landoj, kaj kiun estras Katalin Kovats.
-  Gramatika ekzerco el ĝia Nivelo B1 aperis en Internacia Pedagogia Revuo (09/1) sur paĝoj 16-17-18, kaj sur paĝo 15 en Komencanto 2009/1. En tiu lasta ankaŭ estas priskribo pri la sekcioj de <[edukado.net](http://edukado.net)>: Katalogo, Lerniloteko, Monda Mozaiko, Internaciaj Ekzamenoj (inkluzive malnovajn specimenojn), Legejo, Retligiloj, Kursoj (inkluzive informojn pri metodoj, lerniloj, ekzamenebloj), Koresponda Servo, E-lernejoj, Anoncoj, Metiejo (por faka kunlaboro), kaj Eduka Forumo.
-  Per “Youtube” ĉe <[www.youtube.com/watch?v=QmW06-FUqD4](http://www.youtube.com/watch?v=QmW06-FUqD4)> oni povas aŭdi Esperanto-lernantojn en Burundo,
-  Afriko, kanti “Kanton de la Koloroj”, kies vortojn sendis AAIE-prezidento Ron Glossop, kiu ankaŭ estras “Infanoj Ĉirkaŭ la Mondo”.
-  AAIE-member E. James Lieberman, who tutors students in Levels 1 and 2 of the AATE/E-USA Esperanto Correspondence Course, sent the following information regarding an Esperanto game at <[samopinuloj.esperanto-jeunes.org](http://samopinuloj.esperanto-jeunes.org)>. He writes: “It’s a test not of vocabulary size, but of guessing the word associations of the group. Too much knowledge/imagination works against the score. It harks back to the old word association (psychology) tests, but it raises a question of whether players differ by native tongue as well as size of Esperanto vocabulary. I probably spend one minute each day with this, refer to a dictionary a couple times a week...”
-  He also reports that he and one of his students are using Skype <[www.skype.com](http://www.skype.com)>, which gives them visual real-time sessions via computer, with no need for tapes or paper exchanges!

## ILEI Matters

La ĉijara Konferenco de la Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI) okazos en Krakovo, Pollando, de la 17-a ĝis la 25-a de julio, tuj antaŭ la UK en Bjalistoko. La temo estas “La Pedagogio de Esperanto antaŭ la Defio de Interkultura Komunikado”. Detalojn oni povas trovi ĉe <[www.ilei.info](http://www.ilei.info)> AAIE rajtas sendi kvar reprezentantojn (“Komitatanojn”).

Post la januara eldono de nia *AAIE-Bulteno* aperis numero 09/1 de *Internacia Pedagogia Revuo*, la oficiala organo de ILEI. En ĝi vi

trovos multajn interesajn artikolojn, inkluzive la jenajn:

- 1) “Fuŝoj en la informado pri Esperanto” (p. 34-37);
- 2) “Ekzerco el <[www.edukado.net](http://www.edukado.net)>” (p. 16-18)

[Se vi pagis vian kotizon por AAIE antaŭ la 1-a de februaro, 2009, kaj ne ricevis ekzempleron de *IPR* 09/1, bonvolu informi la redaktoron, por ke ŝi sendu unu al vi.]

## Kalendaro

### Majo 2009

22-25: **57-a Jarkunveno de Esperanto-USA** - St. Louis MO. (Ron Glossop <rglossop@mindspring.com> aŭ <<http://esperanto-usa.org/node/1247>>)

24: **Jarkunsido de AAIE** - Tagmeze - kadre de la jarkunveno de Esperanto- USA (vidu supre)

### Junio 2009

25-28: **Alternative Education Resource Organization (AERO) Conference** - Russell Sage College, Troy, NY (<<http://www.aeroconference.com>>)

29-17 jul: **NASK (Nord-Amerika Somera Kursaro)** - Universitato de Kalifornio en San Diego CA; 3 weeks, 3 levels, 5 college credits. (Ellen Eddy <eddyellen@aol.com> or <<http://Esperanto.org/nask/>>)

### Julio 2009

17-25: **42-a ILEI-Konferenco** - Krakovo, Pollando (Aida Ciziktie, <aiduze@gmail.com>)

25-01 aŭg: **94-a Universala Kongreso** - Bjalistoko, Pollando; pro la 150-a datreveno de la naskiĝo de d-ro Zamenhof en tiu urbo (<[info@uea.org](mailto:info@uea.org)> <[http://uea.org/kongresoj/uk\\_2009.html](http://uea.org/kongresoj/uk_2009.html)>)

25-01 aŭg: **40-a Infana Kongreseto** en junul-gastejo "Bukovisko" de la Eduka Centro de Suprasi, urbeto 16 km de Bjalistoko. (Bert Schumann ĉe <bert.schumann@free.fr> kaj/aŭ <<http://bertosch.free.fr/ik2009/index.html>>)

### Aŭgusto 2009

10-14: **Somera Festivalo** - Barlaston, Anglujo. Du-nivela kursaro kun la eblo turismi. (<[eab@esperanto-gb.org](mailto:eab@esperanto-gb.org)>)

### Novembro 2009

20-22 nov: **American Council on the Teaching of Foreign Languages (ACTFL) Annual Convention and World Languages Expo** - San Diego CA. For more details and for state meetings, see <[www.actfl.org](http://www.actfl.org)>

### 2010

**95-a Universala Kongreso** - En Havana, Kubo


### 2011


**Tut-Amerika Kongreso de Esperanto (TAKE8)** en Brazilio.


*NOTO: Aktuala listo de konataj E-aranĝoj daŭre konsulteblas ĉe: [www.eventoj.hu/kalendar](http://www.eventoj.hu/kalendar)*

## Recommended Reading

The following books are available from Libroservo de UEA, Nieuwe Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015, Nederlando <<http://www.uea.org/katalogo/>>. For the U.S., check "Bookstore" under <<http://Esperanto-USA.org>>

 **Komputeko.** Prikomputila terminoteko. 94p. Listo de pli ol 7,600 terminoj en la uso-angla kun iliaj ekvivalentoj en Esperanto. Ordigita laŭ la anglaj vortoj.

 **Esperanto de nivelo al nivelo.** Lingva ekzameno. 136p. Helpmaterialo por prepariĝi por la ekzamenoj laŭ la Komuna Eŭropa Referenc-kadro.

 **Esperanto Mini-Course.** 10-leciana kurseto por anglalingvanoj bazita sur la populara *Esperanto for Beginners* de Montagu Butler.

## Esperanto-Instruado Alilande

1,416 people have studied Esperanto in 200 classes at the Seoul Esperanto Cultural Center in **Korea** since 1991.

Last November some 50 students and several professors completed a basic Esperanto course at the College for Professional and Technical Studies in Foshan, near Canton, **China**. Included was correspondence with Esperantists in **Poland, France**, and the **Ukraine**. Even more students were expected to take the intermediate course March through June, 2009.

Twelve Natural Science students at Palacky University in Olomouc, and 42 Education students at Masaryk University

in Brno, both in the **Czech Republic**, completed a beginning Esperanto course last December. A continuing course was offered this spring.

Esperanto students from a school in Istanbul, **Turkey**, participated in a Mid-East Esperanto convention in Iznik, Turkey, April 3-6, together with 40 Esperantists from 17 countries.

For the tenth consecutive year Esperanto was taught at the University of **Costa Rica** during a credit course consisting of 16 three-hour classes. Twelve students completed the course.

## Want to Correspond

- Mi estas 16-jara studentino, komencanto. Intereso: muziko, lingvo-lernado. Mi volas havi korespondadon kun gejunuloj el la tuta mondo. Antonella Morano, 9 de julio 167 (n), Piquillin, Cordoba, 5125, **Argentino** <[anto22\\_rock@hotmail.com](mailto:anto22_rock@hotmail.com)>#
- Mi estas 18-jara studentino. Intereso: muziko, kinofilmoj, bestoj. Mi lernas en la gimnazio. Mi ŝatas rigardi filmojn kaj mi ŝatas legi la librojn de Stephanie Mayer kaj J. K. Rowling. Viktoria Vincze, Kaposvar, **Hungario**. <[vikivincze@freemail.hu](mailto:vikivincze@freemail.hu)>
- Mi estas 18-jara fraŭlo, komencanto, studento. Mi serĉas alilandajn korespondantojn. Andres Rodas, Medelin, **Kolombio**. <[andresrv91@hotmail.com](mailto:andresrv91@hotmail.com)>#
- Mi estas 20-jara fraŭlino, komencanto. Studento de fako, kiu estas ideogramoj de Ĉinio. Intereso: kulturo. Mi volas korespondi tutmonde. Sang-hi Hang, Seoul, **Korea Respubliko** <[ka-ja@hanmail.net](mailto:ka-ja@hanmail.net)>#
- Miaj geamikoj simple vokas min Fafah. Mi estas 26-jaraĝa instruistino de la angla. Mi volas korespondi kun eŭropanoj, kanadanoj, japanoj, ĉinoj aŭ usonanoj samaĝaj aŭ pli aĝaj, se eblas. Sed ĉiuj estas bonvenaj. Mi ankaŭ volas longdaŭran korespondadon. Mi ankaŭ ŝatas paperpoŝton. Rafanomezaantsoa Falimanana, Crinfp BP 69 Moramanga 514, **Madagascar** <[diosoa@yahoo.fr](mailto:diosoa@yahoo.fr)>#
- Mi estas 18-jara studentino pri psikologio. Al mi plaĉas muziko, libroj, bestoj, promeni kaj sporti. Mi ŝatus korespondi kun gejunuloj kun similaj intereso. Veronika Poĉepova, ul. Severnij projezd, 3, kv. 33, 183038 Murmansk, **Rusio**. <[pchepcvemika@rambler.ru](mailto:pchepcvemika@rambler.ru)>#
- Mi estas 21-jara studento de Instituto de Fremdaj lingvoj ĉe Ŝtata Pedagogia Universitato en Jekaterinburg, **Rusio**. Mia fako estas la germana lingvo. Miaj intereso estas ligitaj al Esperanto--instruado, vojaĝoj, renkontiĝoj ktp - mi aktive laboras en pluraj E-kampoj. Mi ĵus lanĉis E-kurson en mia urgo kaj akceptas korespond-dezirojn por miaj gekursanoj, plej parte studentoj kaj junuloj. Arina Osipova <[tigrrik@mail.ru](mailto:tigrrik@mail.ru)>##
- Mi (Viktor Kudrjavcev) estas fondinto de "Koresponda Servo Universala", redaktoro de internacia revuo *Komencanto*, E-instristo kaj ĝenerale aktiva esperantisto kune kun miaj 51 jaroj! Mi invitas ĉiujn aktive partopreni en la projekto kaj fari vian korespond-anoncon kaj vian foton ĉi tie! <[esperanto-plus@mail.ru](mailto:esperanto-plus@mail.ru)>

#El *Komencanto* 2009/1##El Koresponda Servo Universala <[esperanto-plus@mail.ru](mailto:esperanto-plus@mail.ru)>

## Kunlaboro

- The American Association of Teachers of Esperanto is listed in the current Directory of The Modern Language Association (MLA) (26 Broadway, 3rd floor, New York, NY 10004-1789).
- The Center for Advanced Research on Language Acquisition (CARLA) at the University of Minnesota (140 University International Center, 331 17th Ave. SE, Minneapolis MN 55414; <[www.carla.umn.edu](http://www.carla.umn.edu)>) is offering 16 short (2-5 days) "Summer Institutes" covering such subjects as Immersion, Culture as the Core, Content-Based Instruction, and Second Language Acquisition between June 22 and July 28, 2009.

## From and About Our Members

- Bonvenon al nova AAIE-membro **Mary F. C. Marks** el Dallas Texas! Ŝi estas emerita instruisto.
- **Enrique Ellemberg** (Fremont CA) sendis la jenan mesaĝon la 1-an de marto ĉijare pri nia nova Eduka Sekretario, **Sherry Wells** (Royal Oaks MI):  
 "Mi gratulas Sinjorinon Sherry Wells kaj ŝian filinon Amanda menciitaj en hodiaŭa artikolo en 'Home Town Life': Locals trek to new exhibit at Detroit Science Center Mirror - Royal Oak MI...:  
 "Sherry Wells of Ferndale is a long-time member of the USS Intrepid. She gave lessons in Esperanto (a universal language) to Trekkies who were waiting in line at a Star Trek convention more than 15 years ago..."
- **John P. Prystupa Jr.** (Uniontown, PA) skribis la 9-an de marto ĉijare "Kiel instruisto, mi ne laboras nuntempe."
- **Elizabeto kaj Filipino Dorcas** (Fort Worth TX) estis en foto kiu aperis en *Usona Esperantisto* 2009/1. Temas pri Esperantistoj kiuj festis la naskiĝtagon de Zamenhof ĉe ilia hejmo pasintan decembron.
- **Boris Kolker** (Cleveland Heights OH), kies lernolibro *Vojaĝo en Esperantolando* ankoraŭ troviĝas en la "furorlisto" de UEA, faros kvar prezentaĵojn ĉe la E-USA landa kongreso en Sankta Luiso fine de majo. Aliaj AAIE-membroj kiuj prezentos programerojn tie estas **Enrique Ellemberg** (Fremont CA), **Sherry Wells** (Royal Oaks MI), **Lusi Harmon** (Oakland CA), **Duncan Charters** (Elsah IL), kaj **Martha (Mar) Cardenas** (Santee CA). Mar ankaŭ estas membro de la teamo kiu zorgas pri <[Edukado.net](http://Edukado.net)>.
- **Doroteo Holland** (Santa Barbara CA) printigas kaj forsendas ĉi tiun *Bultenon* meze de fajrego en sia regiono. Bonŝance, ŝia domo ne estas en danĝero--ĝis nun.

## Anoncoj

☉ If you plan to be at the Esperanto-USA convention in St. Louis May 22-25, remember to attend the AATE annual meeting Sunday, May 25, beginning at noon. Also available are Esperanto examinations on 3 levels

(tentatively scheduled for Sunday evening, May 24).

☉ Ne forgesu kontroli nian novan ret-paĝon <<http://aaie.us>> de tempo al tempo...

## Two Ways You Can Help Create a New Esperantist

1. If you find someone who seems interested in learning Esperanto but doesn't have access to a computer or a local class, mention that a beginning Esperanto correspondence course is available from Esperanto-USA. The fee is \$63 and includes all study materials and a personal tutor. (See application blank on page 7) If the \$63 fee is a handicap, tell the prospective student to apply for a scholarship.

2. Make a donation to Esperanto-USA's Goldman Fund, which provides scholarships for prospective Esperanto correspondence-course students (Levels 1 and 2).

Need more information? Contact Dorothy Holland (<[dorothyjeanh@gmail.com](mailto:dorothyjeanh@gmail.com)>; phone 805-967-5241)

## Jarraportoj

### Raporto de la Prezidanto

Dum la pasinta jaro tre granda pliboniĝo por nia organizaĵo estis la starigo de ret-paĝo <<http://aaie.us>> farita de nia Vic-Prezidanto Gary Grady. Tie oni povas vidi novaĵojn pri nia organizaĵo. Gary mastrumas la ret-paĝon kaj ankaŭ multe helpas Doroteon kun la BULTENO. Li formatigas ĝin kaj elsendas la elektronikajn ekzemplerojn.

Alia grava ŝanĝo kiun ni ekdiskutis estas la nomo de nia organizaĵo. Ĉar la instruantoj de Esperanto en Meksiko volas havi sian propran organizaĵon, ni devus havi alian nomon. Ni nun voĉdonas pri ŝanĝo al "Esperanto-Instruantoj en Kanado kaj Usono (EIKU)".

Mi tre ĝojas ke Sheri Wells konsentis iĝi nia nova Eduka Sekretario. Ŝia ofic-periodo daŭros ĝis 2010. Samtempe mi devas diri ke mi ne povis trovi iujn ajn kiuj servos en nia ĉi-jara Kandidatiga Komitato. Ĝis nun mi mem devas fari ĉion. Por la venonta jaro ni devos trovi kandidatojn por Prezidanto, Vic-Prezidanto, kaj Koresponda Sekretario. Mi estas preta esti kandidato por Prezidanto, sed mi ankoraŭ devos trovi kandidatojn por la aliaj du postenoj. Se vi havus intereson pri tio, bonvolu kontakti min.

Mi tre dankas al Doroteo Holland. Ŝi ne nur redaktas nian *Bultenon* sed ankaŭ protokolas por niaj jarkunsidoj kaj estras la ekzamenojn por nia organizaĵo.

Mary Napolitan, nia Kasisto, kaj Sali Lawton, nia Koresponda Sekretario bone laboris dum la jaro, do ĉio estas en ordo rilate al nia kaso kaj la komunikado kun niaj membroj.

Nia kunlaboro kun la Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI) iom suferis dum la jaro ĉar neniu el Usono povis ĉeesti la ILEI-jarkonferencon en Benino. Mi opinias ke dum la venonta somero almenaŭ tri el niaj membroj Duncan Charters, Lusi Harmon, kaj Vilĉjo Harris) partoprenos la ILEI-konferencon en Krakovo, Pollando.

Mi mem ĉi-jaron instruis Esperanton al klaso ĉe dua grada lernejo kaj al klaso ĉe Sud-Ilinojsa Universitato en Edwardsvilo, kaj mi esperas ke mi havos ŝancon instrui unu-semajnan kurson en somera programo por infanoj.

-- Ron Glossop, Prezidanto, AAIE

### Raporto de la Vic-Prezidanto

Dum la pasinta jaro mi starigis novan retejon por AAIE, helpis Doroteon pri la aspekto de la *Bulteno*, kaj verkis rubrikon pri Esperanto-instruado por la organo de Esperanto-USA, *La Usona Esperantisto*.

Dum la unuaj monatoj de la nuna jaro mi helpis studentinon ĉe la Nord-Karolina Lernejo pri Scienco kaj Matematiko, kiu volis studi Esperanton unuope. Ŝi ricevis A-, kaj la oficiala lingvoinstruisto kiu prizorgis la kurson miris pri kiom ŝi lernis dum nur kelkaj semajnoj. La studentino ekinteresiĝis pri Esperanto dum la antaŭa lerneja jaro kiam ŝi studis la hispanan en kurso instruita de d-ro Don Houpe, longtempa Esperantisto kaj membro de AAIE kiu bedaŭrinde forpasis lastsomere.

-- Gary Grady, Vic-Prezidanto

### Raporto de la Kasisto

Por la periodo 6-30-2008 ĝis 4-24-2009

Saldo je 6-30-2008	\$2830.25
Enspezoj	+1310.00
Tutaj Bonhavo	4140.25
Elspezoj	
ILEI	760.00**
Bultenoj	133.55
Entute	-893.55
Saldo je 4-24-09	\$3246.70

-- Mary Napolitan, Kasisto

\*\*Noto de la Redaktoro: Tiu sumo estas por 41 ILEI-kotizoj por 2009

### Raporto de la Perkoresponda Esperanto-Kursaro

De la 8-a de julio, 2008, ĝis la 1-a de majo, 2009

Ĉijare entute aliĝis 6 novaj kursanoj, 1 finstudis kaj 92 ankoraŭ lernas, kvankam la plej multaj ne aktivas. Lastjare aliĝis 2 novaj, finstudis 1, kaj entute lernis 87. Jen la detaloj:

**Nivelo 1:** 3 novaj kursanoj aliĝis; finstudis neniuj kaj entute estas nun 56 kursanoj. Lastjare 2 aliĝis, 1 finstudis, kaj entute estis 53 kursanoj.

Fidele deĵoris kiel instruanto E. James Lieberman. (Potomac MD).

La lernolibro por ĉi tiu kurso estas *Jen Nia Mondo I*, kun sonbendo.

Kurs-kotizo: \$63, el kiu la instruanto ricevas \$16.50 kaj la administranto \$3.00.

**Nivelo 2:** Unu nova kursano aliĝis, kaj 0 finstudis. Lastperiode 1 aliĝis kaj 1 finstudis, kaj estis 21 kursanoj (estas nun 22).

Instruanto: E. James Lieberman (Potomac MD).

La lernolibro por ĉi tiu kurso estas *Jen Nia Mondo II* kun sonbendo.

Kurs-kotizo: \$63, el kiu la instruanto ricevas \$16.50; la administranto, \$3.00

**Nivelo 3:** Neniuj kursanoj aliĝis kaj 1 finstudis (John Edsall Strickland el Fort Myers FL). Lastperiode 2 aliĝis, kaj neniuj finstudis. Entute estas nun 5 kursanoj; lastjare, 6.

Instruanto: Doroteo Holland (Santa Barbara CA)

La lecionoj baziĝas sur la unua duono de *Vojaĝo en Esperanto-Lando* de Boris Kolker.

Kurs-kotizo: \$73.75

**Nivelo 4.** Neniuj novaj kursanoj aliĝis; neniuj finstudis ĉijare; same lastjare; ankoraŭ restas 5 kursanoj. Lastjare same. La administranto pretas instrui se venos novaj kursanoj.

La lecionoj baziĝas sur la lasta duono de *Vojaĝo en Esperanto-Lando* de Boris Kolker.

Kurs-kotizo: \$73.75

Estas kuraĝige ke ĉijare aliĝis 6 novaj kursanoj (eble helpis ke mi aperigis tut-paĝan aliĝilon en Usona Esperantisto (2009/1). Tamen, plejparte nur tiuj kiuj ne havas aliron al komputilo (ĉefe maljunuloj) interesas pri paperaj perkorespondaj kursoj. La junuloj kiuj volas lerni Esperanton turnas sin al la reto (<edukado.net> kaj <lernu.net>) Mi ne scias kiuj instruas tiujn kursojn nek kiom da aliĝantoj ili havas.

*Financa Raporto de la Perkoresponda Esperanto Kursaro (PEK):*

Saldo la 8-an de julio, 2008	\$29.65
Ricevitaj de E-USA	+112.50
Tuta bonhavo	142.15
Elspezoj	
Al instruantoj por ĉiu nova kursano	97.00
Al la administranto por poŝto	5.73
Al kaligrafiisto (po \$5)	10.00
<i>Entute</i>	-112.73
Saldo la 1-an de majo 2009	\$29.42

## Esperanto-USA's Correspondence Courses

Here's information that may be of interest to you or anyone you know who wants to develop a better command of Esperanto:

*Perkorespondaj Esperanto-Kursoj (PEK)*

- Are you one of those rare people who don't have access to a computer, and/or aren't comfortable surfing the web? Or would you simply prefer a traditional correspondence course?

- Would you like an opportunity to learn and/or improve your Esperanto at your own pace, with a private tutor?

If you answer "Yes" to either of these questions, we invite you to enroll in one of E-USA's correspondence courses. They are available in four levels (you decide which one is best for you), and there is no time limit:

-----

Levels One and Two emphasize the development of everyday conversational skills.

**LEVEL ONE** • Using the textbook and CDs for the popular *Jen Nia Mondo I* course, this twelve-lesson course will guide you to mastery of basic Esperanto.

**COURSE MATERIALS:** Workbook (32 pages), *Jen Nia Mondo I* book (66 pages), and 3 *Jen Nia Mondo I* CDs. Course fee: \$63

If you already have the book, deduct \$14.80. If you have the 3 CDs, deduct \$24.60.

**LEVEL TWO** • This thirteen-lesson course focuses on a more detailed analysis of Esperanto as a language in its own right, and is recommended for the serious student as a follow-up to Level One.

**COURSE MATERIALS:** Workbook (53 pages), *Jen Nia Mondo II* book (89 pages), 3 *Jen Nia Mondo II* CDs. Course fee: \$63

If you already have the book, deduct \$11.30. If you have the 3 CDs, deduct \$24.80

-----

**LEVELS THREE AND FOUR**, both conducted primarily in Esperanto, use Boris Kolker's *Vojaĝo en Esperanto-Lando*, which is not only an advanced textbook but also a guide to the Esperanto movement and culture. Each chapter contains several short readings from Esperanto literature, footnotes, illustrations, and questions. Students who wish to improve their speaking and listening skills are encouraged to ask their instructor to suggest ways to practice these skills. Course fee: \$73.75 each

If you already have the book, deduct \$31.75.

The course registration form appears on the following page.

## ESPERANTO-USA CORRESPONDENCE COURSE REGISTRATION FORM

Return this form with payment to Esperanto-USA, P.O. Box 1129, El Cerrito CA 94530

Name: \_\_\_\_\_ Date: \_\_\_\_\_

Address: \_\_\_\_\_

City: \_\_\_\_\_ State: \_\_\_\_\_ Zip: \_\_\_\_\_

Telephone/Fax: \_\_\_\_\_ Email: \_\_\_\_\_

Please enroll me in the correspondence course checked below. I am enclosing \$ \_\_\_\_\_  
*Make checks payable to "Esperanto-USA"*

Credit card type:     AmEx     Discover     MasterCard     Visa

Credit card number: \_\_\_\_\_ Expiration date: \_\_\_\_\_

Cardholder name and address if different from above: \_\_\_\_\_

LEVEL ONE: Basic Esperanto -- \$63.00

I already have the textbook *Jen Nia Mondo I* (deduct \$14.80)

I already have the three CDs for *Jen Nia Mondo I* (deduct \$24.60)

LEVEL TWO: Intermediate Esperanto -- \$63.00

I already have the textbook *Jen Nia Mondo II* (deduct \$11.30)

I already have the three CDs for *Jen Nia Mondo II* (deduct \$24.80)

LEVEL THREE: Advanced Esperanto Part 1 -- \$73.75

I already have the textbook *Vojaĝo en Esperanto-Lando* (deduct \$31.75)

LEVEL FOUR: Advanced Esperanto Part 2 -- \$73.75

I already have the textbook *Vojaĝo en Esperanto-Lando* (deduct \$31.75)

# American Association of Teachers of Esperanto

## COURSE REPORT FORM

### INSTRUCTOR

Name Address \_\_\_\_\_

Email address \_\_\_\_\_

### COURSE

Location \_\_\_\_\_

Tuition cost \_\_\_\_\_

Level: Elementary \_\_\_\_\_ Intermediate \_\_\_\_\_ Other \_\_\_\_\_

Beginning and ending dates \_\_\_\_\_

Number of lessons \_\_\_\_\_ Duration of each lesson \_\_\_\_\_

Material used: Books \_\_\_\_\_

Videos \_\_\_\_\_

Other \_\_\_\_\_

### STUDENTS

Number finishing course \_\_\_\_\_ Age range \_\_\_\_\_

Previous language skills \_\_\_\_\_

Is the course shown in the student records? \_\_\_\_\_

Was an AATE exam administered? \_\_\_\_\_

### FORMATION OF CLASS

Name of organizer \_\_\_\_\_

Publicity method used \_\_\_\_\_

Supplier of course materials \_\_\_\_\_

### COMMENTS OF INSTRUCTOR

Concerning publicity

\_\_\_\_\_

\_\_\_\_\_

Concerning materials

\_\_\_\_\_

\_\_\_\_\_

Concerning teaching

\_\_\_\_\_

\_\_\_\_\_

*Please return this form to:*

Sherry Wells  
P.O. Box 1338  
Royal Oaks, MI 48068

E-mail: <esperantosherry@tm.net>



# American Association of Teachers of Esperanto

## MEMBERSHIP FORM

Voting members consist of professional educators (either active or retired) who are interested in Esperanto, and non-professionals who teach, have taught, or intend to teach Esperanto.

NAME \_\_\_\_\_ PHONE ( ) \_\_\_\_\_

ADDRESS \_\_\_\_\_

CITY. STATE \_\_\_\_\_ ZIP \_\_\_\_\_

E-MAIL ADDRESS \_\_\_\_\_

I do not want the following information to appear in the AATE membership list:

My telephone number  My e-mail address  Other \_\_\_\_\_

NAME & ADDRESS OF SCHOOL \_\_\_\_\_  
\_\_\_\_\_

Are you a professional educator?  Yes, active  Yes, retired  No

Annual dues are \$40. Memberships are for the calendar year. If you join in the middle of the year, you will receive "Bulletins" previously distributed during that year. All AATE members are automatically members of the International League of Teachers of Esperanto (Internacia Ligo de Instruistoj de Esperanto) and receive their quarterly *Internacia Pedagogia Revuo*.

If you wish to receive AATE's Bulletin and ILEI's *Internacia Pedagogia Revuo* electronically, instead of via regular mail, the annual dues are \$20. Please indicate here: \_\_\_\_\_

Life Membership \$800 \_\_\_\_\_ with subscriptions by mail \$400 \_\_\_\_\_ with electronic subscriptions

What year is this membership for? 20\_\_\_\_  New  Renewal Today's date: \_\_\_\_\_

I wish to give \$ \_\_\_\_\_ as a donation to AATE.

Make your check payable to "American Association of Teachers of Esperanto" or "AATE" and mail it with this form to Sally Lawton, 12 Stage Road, Westhampton, MA 01027